

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

N-ro 31, 8. Majo 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

★ Eliras semajne. ★



Urbdomo en Essen.

LA URBO DE LA X-a KONGRESO DE GERMANAJ ESPERANTISTOJ.

Dum jarcentoj *Essen* havis estadon ne envidindan de tre modesta kampa urbo. Antaŭ milo da jaroj la pia episkopo Alfred el Hildesheim fondis tie la Oberhofon „Assinde“ aŭ „Essende“ kaj monaĥinejon por nobelinoj. Reĝoj kaj imperiestroj favoris la monaĥinejon farante donacojn kaj levis ĝian abatinon eĉ al la rango kaj aŭtoritato de reganta ŝvereno. El la konstruaĵoj de la estinta monaĥinejo konserviĝis la kancelario de la princo-abatino kaj parto de la ĉefpreĝejo (la nuna „Münsterkirche“) kaj de la navo. De la ĉefpreĝejo, rigardindajo laŭ ĉia vidpunkto, precipe admirinda estas la nobla okcidenta konstruaĵo, devenanta el la X-a jarcento, la ĥoro, kriptokaj.

Esperante trovi tie sekurecon dum la militaj tempoj kaj pli facile atingi bonstatojn per komercaj kaj industriaj okupoj, multaj terkulturistoj koloniis najbare de la nova abatejo. Tiamaniere ekstis la malgranda urbo Essen, kiun la imperiestro Henriko III-a rajtigis aranĝi foiron kaj poste ŝirmis per remparo la ĉefepiskopo Konrad von Hochstaden el Kolono.

Sed dum la sekvintaj jarcentoj haltis la plua evoluado, kaj ne pli frue Essen vekigis el la dormo, ol kiam la prusaĵ grenadistoj okupis la urbon en 1802, kaj Essen kun siaj 4000 loĝantoj aliĝis al la prusa monarĥio. Tio estis grava momento en la historio de la urbo. Ĉar poste komenciĝis florado preskaŭ senekzempla. Essen havis 25 000 loĝantojn en 1865, 56 000 en 1873, 100 000 en 1896, 180 000 en 1901 kaj nuntempe pli ol 500 000. La ĉefa instiganto al tiu florado estis viro genla, nobla, senlaca, pri sukceso neniam dubanta, kies nomo estas **Alfred Krupp**.

De tiu tempo oni povas paroli pri la industria Essen, kaj la tuta mondo scias, kiajn gigantaj sukcesoj akiris la diligentece kaj persiste de Krupp, kaj kion produktis la nobla animo de tiu homo, kiu agis laŭ la fame-konata devizo: „La celo de la laboro estu la komuna bonstato!“

Dum longa tempo la fabriko de Krupp estis preskaŭ la sola industria entrepreno en Essen. Sed baldaŭ oni opiniis rekomendinde kaj eĉ en cese fondi ankaŭ aliajn grandajn fabrikojn, apogi la komercon kaj per tio subteni la diversajn metojn. Intertempe la cirkonstancoj pli kaj pli, per stultaj plivastigoj de la urbo. Kaj rapide ĝi kreskis! Grandajn najbarajn komunumojn oni aliĝis, kaj nuntempe oni ne nur parolas pri la urbego, sed

(Fino sur la 2-a paĝo.)

Esperanto kaj Scienco.

21 Membroj de la Franca Akademio de l' Sciencoj subskribas Rezolucion por Esperanto.

Ĉiam pli granda'n cirklojn atingas la intereso por Esperanto, kaj certe ne estas la plej malsaga, kiuj venas al la konkludo, ke internacia helplingvo faritas de tazo al tago pli necesa. Dume kelkaj rondoj en nekomprenbla blindo ankoraŭ obstine kontastaras la „Esperantomalsagaĵon“, ne volante kompreni la postulojn de nia tempo, — tuj rondoj, kiuj ankaŭ kontraŭstaris kaj prididatis stampe la enkondukon de „veturilo sen ĉevalo“, de „metalladeno vortorianta“, de „direktbla ŝipo naviganta tra l' aero“ ktp. — dume tiuj rondoj estas aŭ tro malsagaj aŭ tro inertaj aŭ ĝenerale tro kontraŭprogresaj kaj kontraŭkulturaj por helpi nin en nia verko. — dume la sama tempo viroj famaj de l' komerco, de la scienco kaj eĉ de la politiko esprimas sian favoron, donas sian voĉon kaj subtenon al nia grandidea movado. Viroj, kies nomoj havas bonan sonon en la tuta mondo; viroj, pri kies saĝeco kaj faksperiteco povas neniu dubi. Se tial viroj klare ekkonas la utilon kaj neceson de internacia helplingvo, neniu plu havas la rajton titoli kaj primoki nin kiel revolĵin kaj utopiistojn. Pioniroj ni estas de granda kulturideo; tiu konvinko nin hardas en nia batalo, kaj ni ne formetos la batalilojn, ĝis kiam la plena venko estos atingita.

Jam en nia antaŭa numero ni mallonge raportis pri la nova sukceso de la Akademio de l' Sciencoj en Paris. Hodiaŭ ni represas la aŭtentikan dokumenton en franca lingvo kun apuda esperanta traduko. Espereble tiu rekono de Esperanto per famaj kaj plei kompetentaj intelektuloj bone fikos sur tiujn sciencistojn, kiuj kredas ne digna je sia atento la „fusajon“ de la pola okulkuracisto.

Jen la dokumento:

Les soussignés, membres de l'Académie des Sciences,

convaincus que l'adoption de la langue auxiliaire Esperanto dans les relations internationales aurait des conséquences d'une immense portée au point de vue du progrès des sciences et de leurs applications; qu'elle permettrait d'entendre le rayonnement de la science française au-dehors et, par là, l'influence intellectuelle de notre pays, émettent le vœu:

1. que l'enseignement de cette langue, chef-d'œuvre de logique et de simplicité, soit introduit, au moins à titre facultatif, dans les programmes officiels des classes de sciences de tous les établissements d'instruction;

2. que, dans les congrès internationaux, elle soit adoptée comme langue officielle au même titre que les langues nationales, jusqu'au moment où l'expérience confirmera qu'elle est apte à en devenir la seule langue officielle;

3. que l'attention des directeurs des maisons d'éditions scientifiques ou techniques soit appelée sur l'intérêt que présenterait pour eux l'usage de cette langue, dans leurs publications destinées à l'étranger;

4. que, dès maintenant, les savants et les techniciens se mettent en mesure de s'en servir dans leurs relations avec leurs collègues étrangers, et leurs fassent ensuite connaître qu'ils sont prêts à en faire usage;

5. qu'une Commission soit nommée pour préparer et élaborer les Vocabulaires des sciences pures en Esperanto, et que les Sociétés techniques soient invitées à faire de même en ce qui concerne leur spécialité.

La subsignintoj, membroj de la Akademio de l' Sciencoj,

konvinkitaj, ke la alpreno de la helplingvo Esperanto en la internaciaj rilatoj havas konsekvencojn de nemezurebla graveco vidpunkte de la progreso de l' sciencoj kaj de iliaj aplikoj; ke ĝi permesus etendi la elradiadon de la franca scienco eksteren kaj, per tio, la intelektan influon de nia lando,

esprimas la deziron:

1. ke la instruado de tiu ĉi lingvo, ĉefverko de logiko kaj simpleco, estu enkondukata, almenaŭ kiel nedeviga, en la oficialaj programoj de la sciencaj klasoj de ĉiuj instrujoj;

2. ke, en la internaciaj kongresoj, ĝi estu akceptata kiel oficiala lingvo, egalrajte al naciaj lingvoj, ĝis la momento, kiam la sperto pruvos, ke ĝi kapablas fariĝi ilia sola oficiala lingvo;

3. ke la atento de la direktoroj de sciencaj aŭ teknikaj eldonejoj estu aldirata al la intereso, kiun prezentus al ili la uzado de tiu ĉi lingvo en iliaj publikajoj destinitaj por la eksterlando;

4. ke de nun la sciencistoj kaj teknikistoj preparu sin por uzi ĝin en siaj rilatoj kun siaj eksterlandaj kolegoj kaj konigu poste al ili, ke ili estas pretaj uzi ĝin;

5. ke komisiono estu nomata por prepari kaj ellabori la vortaron de la puraj sciencoj en Esperanto, kaj ke la teknikaj societoj estu invitataj pri la samon koncerne ilian specialecon.

D'Arsonval, Professeur de physiologie au Collège de France.

Daniel Berthelot, Président de la Ligue française de l'Enseignement et de la Société de Navigation aérienne.

Bigourdan, Astronome à l'Observatoire de Paris, Président de la Commission internationale de l'Heure, membre du Bureau des Longitudes.

Gaston Bonnier, Professeur de botanique à la Sorbonne.

Général Bourgeois, Sénateur, Ancien Directeur du Service Géographique de l'Armée, membre du Bureau des Longitudes.

C. Breton, Député, Ancien Ministre.

J. Carpentier, Fabricant d'instruments de précision, membre du Bureau des Longitudes.

Charpy, Directeur général adjoint de la Société des Forges et Aciéries de la Marine à Homécourt.

Costantin, Professeur de botanique au Muséum d'histoire naturelle.

Deslandres, Directeur de l'Observatoire d'Astronomie Physique de Meudon, membre du Bureau des Longitudes.

Amiral Fournier, Président de la Société d'Océanographie de France, membre du Bureau des Longitudes.

P. Janet, Directeur du Laboratoire Central d'Electricité, Président de la Société française de Physique.

C. Lallemant, Inspecteur général des Mines, Directeur du Service du Nivellement général de la France, membre du Bureau des Longitudes.

Maurice Leblanc, Président du Comité Electro-Technique international, Ancien Président de la Société internationale des Electriciens.

Lecornu, Inspecteur général des Mines, Professeur à l'École Polytechnique.

Lindet, Professeur à l'Institut Agronomique, Ancien Président de la Société d'Encouragement à l'Industrie nationale.

Lumière, Administrateur de la Société des Etablissements Lumière, à Lyon.

Prince de Monaco, Président de la Section d'Océanographie de l'Union internationale de Géodésie et de Géophysique.

Charles Richet, Professeur à la Faculté de Médecine, membre de l'Académie de Médecine.

Général Sebert, Président du Conseil d'Administration des Forges et Chantiers de la Méditerranée.

Fernand Widal, Professeur à la Faculté de Médecine, membre de l'Académie de Médecine.

eĉ pri la metropolo Essen. *Metropola estas la tumulto movado en la stratoj, la fervoja trafiko, la gigantaj magazenoj kaj hoteloj laŭ plej moderna stilo: metropolaj estas la ĉarmaj kaj modelaj loĝejoj kolonioj en la novaj kvartaloj de la urbo; metropola estas la impona salonaro, en kies salonoj koncentriĝas la vigla spirita kaj socia vivo de l' urbanaro kaj kie havas lokon ankaŭ ĉiuspecaj kongresoj kaj festaj kunvenoj; metropola estas la urba parko, kiu laŭ la juĝo de kompetentuloj apartenas al la plej belaj parkoj en la tuta provinco; metropola estas la urba orkestro kun ĉirkaŭ cent muzikistoj-virtuozoj, pri kiu kompetenta muzikverkisto diris: „Ĝi estas unu el la unuarangaj orkestroj en la tuta mondo.“

Ne estas la celo de tiu ĉi artikolo priskribi la multnombrajn vidindaĵojn de la urbo, la antikvajn kaj modernajn konstruaĵojn, la parkojn kaj ĝardenojn, nek la ĉarmajn ĉirkaŭaĵojn, la idiliajn montojn, la afablajn urbetojn kaj la verdajn arbarojn de la Ruhr-valo. Cion la vizitantoj de la urbo kaj precipe la partoprenantoj de la kongreso mem rigardu. Sed pri unu vidindaĵo almenaŭ estu atentigata, pri la mondfamegaj fabriko kaj verkoj de Krupp.

Tiu fabriko de ŝtalo fandita estas loko de seninterrompa laborado, kiu eĉ ne ĉesas, kiam malleviĝas la suno kaj dormo kovras la lacigitan teron. Ĉiuloke estas tie vivado kaj movado. La fajfoj de la lokomotivoj kaj longedaŭraj sonoj de la vaporsirenoj sin miksas kun kontinua susurado, muĝado, frapado kaj martelado. Ankaŭ en la subteraj laborejoj, kie la ministoj elfosas la trezorojn de l' fundo, regas plena movado. Ne estas permesite al fremduloj viziti la laborejojn; tamen nura pasado de la koncernaj stratoj havigos al vi ideon pri la giganta amplekso de la fabrikoj. 1912 laboris tie pli ol tridekkvin mil laboristoj.

Meze de la tumultaj laborejoj staras la eta „prapara domo“, unuetaĝa, en kiu Alfred Krupp komencis sian karieron, Friedrich Krupp establis sian oficejon, kaj de kie patro kaj filo estis kondukataj al la lasta ripozejo (sur la malnova tombejo, najbare de la ĉefstacio).

Preskaŭ senekzemplaj en la tuta mondo estas la institucioj por bonstato kreitaj de Krupp por havigi al siaj laboristoj post la penado de l' tago la plej komfortan ĝuon de l' ripozo kaj refreŝigo: la kolonioj Kronenberg, Schederhof, Alfredshof, Baumhof, Friedrichshof, Altenhof, Margaretenhof aranĝitaj en plej komforta, eĉ idilia maniero, prezentas eminentan vidindaĵon de Essen; plie malsanulejoj, luksaj refreŝigejoj, konsumejoj, helpokasoj ĉiuspecaj, bibliotekoj kun pli ol 100 000 volumoj, kazinoj, klerigaj asocioj ktp. estas al la dispono de laboristoj kaj ofistoj.

Al la germanaj samideanoj estu per tio direktata lastfoja voko, veni multnombro per la X-a kongreso al Essen! Anoncu vin tuj kaj senhezite! Ankaŭ eksterlandaj samideanoj estas kore invitataj.

La Politiko en la Esp. Gazetaro.

En nia lasta numero ni publikigis leteron el Polio, en kiu poliano priskribis siajn opiniojn pri la suprasilezia problemoj. Sekve de tio kelkaj germanaj samideanoj kulpigis la redaktoron de ET, ke li — kiel germano — publikigas kontraŭgermanajn artikolojn.

Antaŭ ĉio ni deklaras, ke la redaktoro de ET en sia eco kiel redaktoro de internacia ĵurnalo devas starigi sin sur pli altan nivelon absolute neŭtralan, kiu permesas al li, superrigardi la tutmondan situacion ne tra la okulvitro de sia propra nacieco, sed frankvile pezi la opiniojn de la diversnaciaj unu kontraŭ la alia.

Estas kompreneble, ke — kiel germano — la redaktoro de ET nepre deziras, ke Supra Silezio restu tuta kaj nedividita ĉe la germana imperio, precipe post la plebiscito tiel favora por Germanio; kaj, laŭ laste ricevitaj sciigoj, la Internacia Komisiono en sia raporto al la Supra Konsilantaro ja proponis lasi preskaŭ tutan Supran Silezion ĉe Germanio. Tamen, la redaktoro de ET neniel rajtas uzi sian ĵurnalon por unuflankaj naciaj celoj kaj devas ĉion eviti, kio povus supozigi, ke li havas tiajn intencojn. Sufiĉas jam, ke estas germano, kiu en nuna tempo de kontraŭgermanismo kuragiĝis eldoni internacian ĵurnalon, ne timante la malamon kaj kontraŭtecon de la mondo sed fidante je la lojala homo sento de la samideanoj. Sed postuli, ke li nun presu en sia ĵurnalo artikolojn plenan je akraj atakoj kontraŭ aliaj nacioj, estus kvazaŭ postuli de li memmortigon.

Certe, nia starpunkto de absoluta neŭtraleco kaj internacieco ne povas malhelpi, ke ni raportas pri tiuj landoj, en kiuj ni havas relative multe da abonantoj, pli ol pri landoj, kie mankas abonantoj. Ĝi ankaŭ ne povus devigi nin rifuzi la enpreson de naciemaj politikaj artikoloj, se ni donus al la atakito okazon defendi sin. Sed kio rezultus el tio? Ke nia ĵurnalo fariĝus scenejo de akraj polemikoj, tute kontraŭaj al la ideo de samideaneco! Ke la loko en nia ĵurnalo ankoraŭ pli mankus, ke multaj samideanoj estus ofenditaj kaj ne plu volus legi gazeton, kiu ripetis la polemikojn de la naciaj ĵurnaloj.

Se nia ĵurnalo jam estus vastege disvastigita, se ĝi jam havis dekmlilojn da abonantoj, se ĝi

disponus pri sufiĉege da loko, ni povus eble konsideri, ĉu estas aliaj elaj tiuj naciemaj polemikoj en internacia ĵurnalo. Sed en la nunaj ĉirkaŭstancoj ni opinias la plej bone, ne enpresi tiajn artikolojn sed akcepti nur tiajn, kiuj estas plej eble objektivaj kaj kiuj serĉas, kiom tio estas ebla, pravigi ambaŭ partiojn, trovi ian sekvoblan mezan vojon, kiu povus esti bazo por interkonsento.

Ni ne estas fanatikaj anoj de ia interna ideo; sed ankaŭ ni opinias, ke paco kaj konkordo inter la diversaj nacioj, precipe inter la samideanoj de diversaj nacioj, estas por la bono de la mondo, kaj precipe por nia movado, multe pli konvenaj kaj pli akcelaj ol batalo kaj polemiko.

Eble estus pli bone, se niaj korespondantoj entute sin okupus malpli pri politikaj aferoj ol pri aliaj aktualaj; okazas preskaŭ ĉiutage en ĉiu lando aferoj, kiuj ne rilatas al politiko, socio aŭ religio, kaj kiuj tamen interesas la tutmondon: kongresoj, konkursoj, akcidentoj, scienco, tekniko, literaturo, arto, sporto ktp. certe estas publikigindaj novaĵoj.

Do ni petas niajn korespondantojn en la diversaj landoj, en estonteco laŭeble eviti la danĝerajn kampojn de politiko, socio aŭ religio aŭ nur tuŝi ilin se necese, kaj limigi sin plejparte je supre menciitaj temoj, kiuj ne povas ofendi la delikatan senton de alinacianoj, alisocianoj aŭ alireligianoj.

La ĵus spirita ekzemplo de la akra polemiko inter la redaktoro de „La Progreso“ kaj tiu de „Esperanto Praktiko“ defingis nin de simila vojo! Ni tenu nian esp. gazetaron pura de tiuj malĝojigaj polemikoj tiel longe kiam tio estas ebla. Certe venos iam la tempo, ke ankaŭ per la esp. gazetaro oni politikos, ke per esp. raportoj la opaj nacioj provos aliri al si la favoron de aliaj nacioj kaj malkredigiĝi siajn kontraŭulojn; similon ni jam spertis dum la mond milito, kaj similon ankoraŭ nun, sed sole laŭ la nobla flanko, faras per sia organo la finnaj samideanoj. Eble oni tiam fondos ĵurnalon, kiu — ne havante propran tendencojn — represos naciemajn artikolojn de anoj de ĉiuj nacioj. Tio organo eble estus interesa, kvankam ĝia rolo ne estus tre nobla. Sed hodiaŭ nia movado estas nur en siaj komencoj, nia lingvo ankoraŭ ne estas ĝenerale uzata, kaj niaj organoj devas havi pli internacian ol nacian tendencojn.

Por la estonteco lojalajn samideanojn konsolu la konvinko, ke ankaŭ en postaj tempoj krom la supre aluditaj naciemaj esp. gazetoj ekzistos aliaj, kiuj restos netuŝataj de l' nacia ŝovinismo, kiuj staros super la ŝanĝemaj politikaj sentoj de l' momento kiel fortikaj internaciaj gvardianoj, kiuj pledos por la bonstato kaj progreso de la tuta homaro.

VII-a Kongreso de Finnaj Esperantistoj en Tampere (25.—28. Marto).

La finnoj ne kutimas fari grandan bruon, ili simple agas. Pri la okazonta kongreso en Tampere (Tammarsfors) oni preskaŭ nenion aŭdis, sed pri la okazinta oni nun aŭdas des pli.

74 samideanoj el 24 lokoj estis kunvenintaj en la plej grava industria urbo de la lando, en Tampere, por prepari sub prezido de s-ro Albin Sandström, prezidanto de la Asocio, la aferojn de nia movado en Finnlando.

Interesa estas la iarraporto pri la agado dum 1920 prezentita al la kongreso. En 20 lokoj estis kursoj kun sume 2000 lernantoj, interalie oficiala kurso ĉe la Finna Liceo en Helsinko kun instruistoj pagita de la ŝtato kaj diversaj kursoj ĉe superaj lernejoj sen ŝtata pago. La Esp. Instituto donis 10 kursojn kun sume 148 lernantoj. La laboro de la Instituto ricevis ŝtatan subvenciojn de 5000 fmk.

La revuo „Esperanta Finnlando“ havas 800 en-kaj 400 eksterlandajn abonantojn.

Bonan propagandon faras la reklamafiŝoj elmetitaj laŭ oficiala permeso en la poŝtkontoroj kaj stacidomoj de la tuta lando.

Intense oni laboris antaŭ kaj dum la Finlanda Foiro, dum kiu oni aranĝis tre kompletan esp. ekspozicion.

La spezoj de la asocio, kiu kalkulas 627 anojn (1 honora, 1 dumviva, 91 izolaj kaj 534 grupaj anoj el 15 grupoj), estis preskaŭ 20 000 mk. Ekzistis speciala fondo de 2000 mk. por propagando inter komercistoj. Aparte librotenataj estas la spezoj de la Instituto, kiuj sumiĝis je pli ol 14 000 mk. La tuta spezo de la Asocio do estis ĉ. 34 000 mk. kontraŭ 15 000 dum la antaŭa jaro. La budĝeto por 1921 antaŭvidas spezon de 45 000 mk. (inkluzive subvencio de 25 000 mk., decidita de la Parlamento).

Tre grava estis la fondo de esp. akcia societato „Movado“ kun akcia kapitalo de 100 000 fmk. Tiu ĉi societato aĉetis paperveŝtejon ĉe Kasarminkatu 20 en Helsinko, en kiu estis ankaŭ lokigata la Esp. Oficejo. En la tri monatoj de sia agado la akcia societato jam havis spezon de 20 000 mk. kaj netan profiton de 1257,86 mk.

Dum la kongreso oni elektis s-ron magistron Werner Antilla honora membro. Prezidanto de la Asocio oni elektis s-ron Albin Sandström, estraranoj s-rojn V. Setälä, L. Jalava, H. Bergroth, A. J. Ahti, S. Antila, G. Cernohovostov, K. S. Ahonius, H. Päiälä, H. Salokannel kaj K. Huuskonen.

Okazis vigla diskuto pri la esp. gazetaro. Pri tio ni eble revenos poste en speciala artikolo.

La kongreso konsideris necese sendi iun delegiton al la Praha kongreso. Oni volas peti de

la ekstera ministerio pagon por propaganda parolado pri Finnlando, farota en Praha. Plue oni decidis, en la Praha kongreso inviti la XV-an Internacian Kongreson al Helsinko. Pri la naciaj kongresoj oni decidis, ke la VIII-a okazu en Helsinko; por la IX-a estas proponitaj Turku kaj Vaasa. Dum la somero oni intencas aranĝi ekskurson al Tallinn.

Samtempe kun la kongreso de la Asocio okazis fakaj kunsidoj de la laboristoj kaj de la instruistoj. Oni povas esperi, ke ili rezultigos plivigligon de nia movado en la koncernaj rondoj.

Konsiderante ĉion, oni devas konkludi, ke nia movado en Finnlando nun estas relative tre progresinta. „Esperanta Finnlando“ havas el ĉiuj 4000 loĝantoj unu abonanton (tio signifus por „The British Esperantist“ 12 000 abonantojn). Finnlando havas 15 grupojn (tio estus por Rejnlando 55, kie fakte ekzistas ĉ. 20 grupoj).

Ni esperas, ke la aliaj baltaj ŝtatoj, precipe Estonio, sekvos la bongan ekzemplon de la finnoj kaj ke al tio multe helpos la dumsumera ekskurso de finnaj samideanoj al Tallin (Reval), ĉefurbo de Estonio.

Laboristoj.

OMSK (Siberio). S-ro B. Najdin instruas Esperanton en Lab. Fakultato de Siberia Instituto de Agrikulturo kaj Industrio. Lernas Esperanton pli ol 120 personoj.

DÜSSELDORF (Germ.). La grupo de Germ. Lab. Esp. Asocio aranĝis la 25. aprilo bonŝuŝecan printempan feston kun alparolado, rika koncertprogramo, danco kaj aliaj amuzoj. La burĝaj grupoj sendis reprezentantojn, ankaŭ la grupo de Benrath. Franca samideano ĉeestis. — La 1. majo la socialistaj samideanoj partoprenis ĉe la procesio kun efika propaganda tabulo kaj disdonis multajn flugfoliojn.

La 1-a de Majo en London.

Paroladoj en Esperanto.

La 1-an de majo en la granda parko nomata Hyde Park havis lokon la kutima demonstracio de la laboristoj. Ĉiuj laboristaj partioj unuiĝas por tiu grava festo. Diversaj sekcioj marŝas procesie al la parko el apartaj kvartaloj de la urbo. En la parko la demonstracio ĉirkaŭas deklud estradon. Sur estradoj n-ro 11 kaj 12 estis paroladoj en Esperanto. La parolintoj estas s-ro Mark Starr, ministro, kaj s-ro T. Ashcroft, membro de la Nacia Unuiĝo de Fervojistoj. Ĉar la parolado de la laste nomita estis iom tro politika por ET, mi citas nur la lastan parton:

... kaj, kamaradoj, tiuj, kiuj estas esperantistoj kiel ankaŭ socialistoj, havas ankoraŭ pli grandan esperon. La progresado de nia internacia lingvo plirapidigas seninterrompe. Esperanto helpos pliproksimigi la popolon, helpos al ili pli facile veni en senperajn rilatojn. Kaj, kvankam ni scias, ke samlandanoj, parolantaj la saman lingvon, ofte malpacas kaj eĉ intermilitas, tamen ni kredas, ke la disvastigo de internacia lingvo estos grava kaŭzo de la kreskanta internacia industria kaj politika forto kaj solidareco de la laboristoj. Esperanto ne celas anstataŭi nacian lingvon, sed nur servi kiel neŭtrala helpo al ili, — kiel trafede diris la fama internaciano Henri Barbusse: „Esperanto estas la paca armilo, kiu venkos la militon.“

La parolado de s-ro Mark Starr estis ĝenerala pledo por Esperanto kun citado de gravaj faktoj pri ĝia progreso. P. J. C.

Polico.

BRAUNSCHWEIG (Germ.). Ĉar la unuaj kursoj ĉe la polico bone prosperis, komencis nun nova kun 40 partoprenantoj. 25 el la progresintoj fondis policanan fakon de loka esp. grupo.

Filatelistoj.

DANZIG. La 28. aprilo s-ro Amort paroladis antaŭ 50 aŭskultantoj, laŭ invito de la filatelista unuiĝo. 25 personoj sin anoncis por kurso gvidota de s-ro W. Hoffmann el Praust.

Kroniko.

BRAUNSCHWEIG (Germ.). Ĉe la fondiĝofesto de la grupo 5 partoprenintoj el la kursoj komencintaj meze de decembro 1920 prezentis teatraĵon kun granda lerteco.

MONTREUX (Svis.). La 10-semajna elementa kurso finiĝis la 21. aprilo per ekzameno. Krom la komitato de la loka grupo „Lemana Stelo“ ĉeestis la eksministro bulgara s-ro S. Siŝanov. — La ĉi-loka gazetaro estas kontraŭ-esperantema kaj mokema. La publiko simpatias kun nia movado. — La grupo „Lemana Stelo“ aranĝis bele sukcesintan feston kun kantoj, deklamoj, loterio ktp. Por sia agado la grupo elektis la devizon: Ni laboru kaj esperu!

JERUZALEMO. En la ĉefa angla ĵurnalo de Jeruzalemo „Palestine Weekly“ d-ro Alex Waldmann, antaŭe profesoro ĉe la Orienta Seminaro en Berlino, anoncas privatajn lecionojn de Esperanto. Adreso: Hotelo Goldenberg, Bucharieh, Jeruzalemo. — En Kineret apud lago Tiberias loĝas esperantisto s-ro J. Muĉnik. Malgrandaj signoj de esp. vivo en la Sankta Lando!

Esperanto en Warszawa.

(Raporto de nia kunlaboranto Ad. Oberroman.)

La kvara reveno de la mortotago de nia majstro estis solenata sur la tombejo. Pro la riĉo de hebrea en tiu monato de Pasko ne povis okazi speciala diservo. Krom la familio ĉeestis granda nombro de esperantistoj, inter ili gastoj el Lodz, s-anoj Sakovic kaj Lejzerovic. En la nomo de la societo „Konkordo“ parolis s-ano J. Litauer, citante la meritojn de la majstro.

La 21. aprilo okazis granda konferenco pri la temo: Scienco kaj lingvo internacia Esperanto en salono de Sala Hygieniczna. Parolis prof. d-ro Charles Richet, eminenta gasto el Francujo, membro de la franca akademio kaj laŭreato per la Nobel-premio, pri la fakteco de la lingvo Esperanto kaj Esperanto kiel internacia ligilo. La dua paroladanto estis universitata prof. J. Baudouin de Courtenay, fama lingvisto, pri deveno de Esperanto en la 20-a jarcento. Kiel tria parolis s-ano Leo Belmont pri la grandaj meritoj de d-ro Zamenhof. La salono estis plena je interesuloj el plej bonaj sferoj. La parolantoj estis tre apudataj.

La 24. aprilo okazis laŭ bonkora invito de s-ino Zamenhof en ŝia loĝejo adiaŭa vespero por prof. Charles Richet. Ĉeestis speciale invitatitaj gastoj, inter ili prof. Baudouin de Courtenay, Leo Belmont, Ant. Grabovski kaj la delegitaro de UEA.

Lingvaj Notoj.

De Walter Lippmann.

Snufi.

En ET n-ro 17 (Lingv. Not. 7) mi provis ion defendi la atakitan Zamenhofan esprimon „flari tabakon“. Sed en ET n-ro 19 (Parolejo 52) la G. AJA atakinto tion bonargumente kaj bonhumore daŭrigis sian atakon, ke mi, infektite per lia G. Ajeco, nepre kapitulacas, kvankam „flari = schnuffen“ estas eĉ Fundamenta. Do mi konfesas, ke la naztukmalpuriga malvirto devas esti nove nomata, ĉar alie la iamaj eminentuloj, kiuj ŝafis la enaŭzigo de tabakpulvoro, ekz. Friedrich la Granda, voĉdonos en la ĉiela konsilantaro kontraŭ Esperanto (la nuntempaj nazŝtopemuloj estas laŭ mia sperto malpli eminentaj — la legantoj de ET estas kompreneble esceptitaj!).

Evidente s-ano G. Ajul ne scias taŭgan anstataŭaĵon de „flar“-tabako, elpreneblan el la ekzistanta vortaro de Esperanto. Se ni estas konservativaj kaj tial insistas pri ĉi tiu fakto, ni certe trovos, ke la esprimoj „naztabako“ (komparu la italan „tabacco da naso“) kaj „nazpreni tabakon“ aŭ „preni naztabakon“ aŭ eĉ „naztabaki“ estas, kvankam ne ĉiel kontentigaj, tamen bone uzablaj kaj kompreneblaj — Sed eble la pli liberala esperantistaro preferos neologismon, kiu havas la avantaĝojn de pli grandaj precizeco kaj mallongeco. Do ni ekzamenu la formojn proponitajn de s-ro G. Ajul:

Tuj ni povas elimini prisi kaj snuvi, ĉar ili estas fonetike-filologie nekorektaj. Ekzistas neniu kaŭzo deviga preferi en ili s kaj v al z kaj f. — Do restas prizi kaj snufi. Inter ili mi preferas la duan por diversaj kaŭzoj: La vorto prizi devenas de la franca priser kaj ĉi tiu de la vorto la prise, kio estas particip-substantivo de prendre = preni. Do pris = prenitaj; (la) prise = aĵo prenitaj, prenajo; priser = fari agon karakterizitan per prenajo. Do en la vorto prizi mankas (etimologie) ĉio, kio povus esprimi la esencan ideon de naz-uzo. Krome la formo prizi en nia senco ne estas internacia, eĉ ne inter la latinidaj lingvoj; ekz. la hispano diras tomar rapé (tomar = preni) aliflanke la vorto la prise, die Prise havas tre diferencajn signifojn, kiuj ĉiuj nomas prenon aŭ prenitaĵon, ekz. la prenon de (malamika) ŝipo, pinĉpren. Ĵin de tiu spicaĵo k. a. En la angla lingvo la substantivo prise kaj prise signifas levilo, levbravo kaj kap(a)jo; kaplita ŝipo; prezo, premio, rekompenco; (loter)gajno, avantaĝo; taksado; — la verbo to prize = forpreni, trakti ŝipon kiel kapitan; la priser estas la taksisto aŭ la premi-aspiranto — sed neniam tabakennaziganto!

Ĉi tiuj kaŭzoj certe ne tute netaŭgigas la radikon priz por Esperanto, sed nur malrekomendas ĝian enkondukon.

Kontraŭe la radiko snuf ŝajnas al mi rekomendinda el sciencaj kaj praktikaj vidpunktoj. Ĝi devenas de malnova germana substantivo snuff = novgermane „Schnauze“, t. e. la — per nazo kaj buŝo formita — antaŭstaranta parto de la (best)kapo. La formo snuff estas evidente sonimita (onomatopea). Do la laŭorigina kaj plej ĝenerala signifo de verbo snuff povas esti: produkti (fortan) fif-similan sonon per — precipe naza — spirado (aŭ aŭdeble uzi sian „snuff“). Tion oni faras en tri ĉefkazoj, kiujn germanaj lingvoj nomas parte per etimologie parencaj vortoj:

1. Kiam oni volas esplori odoron aŭ per flarado sekvi iun aŭ ion laŭ la odoraj postsignoj. Por tio ni ĝis nun ne havas taŭgan esprimon en Esperanto. Ni nomu tiu do snuffi (ne-transitiva) = germ. schnuffeln, angle sniff(le), france renifler, flairer, it. annasare, fiutare, assistare. — Aplik-ekzemploj: Li longe snuffis pri (al, sur) la papero, sed ne sukcesis konstati la devenon de ĝia delikata parfumo. La hundo, apenaŭ veninte en la ĉambron, tuj komencis ĉirkaŭsnuffi, ĉar li ek-

flaris ion de lia odoro. Kiam ajn ŝi venis en mian vendejon, ŝi prisnuffis ĉion, kion ŝi volis aĉeti. Snuffeti germ. schnuffern, schnobbern. Ankaŭ figure: Ĉie li ĉirkaŭsnuffadas (= spionas; angle: to sniff about); snuffemuloj al nudaj (germ. Nudheitsknuffler = personoj, kiuj serĉas, kvazaŭ per la nazo, bildojn k. s. de nudul(in)oj, por povi indigniĝi kaj plendi pri la memoralo). —

2. Kiam oni pro malsano (ekz. astmo), granda sinstreco aŭ alia kaŭzo laŭte kaj malfacile spiras. Tion ni povas nomi snuffegi (ne-transitiva) germ. schnaufen, schnauben, angle to snort (to breathe with difficulty, to be short of breath), france souffler, it. alitare, buffare, buffetare (?). Ekz.: Snuffegante ni alvenis supre sur la turo, ĉar 200 ŝtupojn ni estis grimpiintaj. La malsanulo tiam snuffegas, ke ni fimis, ke li sufokigis. Lia ĉevalo snuffegas. — Kun ion alia signifnuanco: Snuffurigi la nazojn; drako fajron (el)snuffanta. — Ankaŭ figure: Snuffegante la aŭtomobiloj pretretveturis, . . . la vagonaro ekveturis. —

3. Kiam oni per spirado entiras en la nazojn iun „materialon“, nome tabakpulvoro aŭ ion similan. Por tio bone taŭgas la vorto snuffi (transitiva) = germ. schnuffen; angle to (take) snuff; dan.-norv. snuse; france prendre du tabac, priser; it. prendere aŭ pigliare tabacco, tabaccare. — Snuffabako = germ. Schnufftabak, angle snuff, dan.-norv. Snus(tobak) ktp. — Snuffabakujo. Snuffado. — Konfuzo kun snuffi (ne-transitiva) en la 1-a signifo ne estas timenda, ĉar la tuteksto devas tuj montri, kion oni volas esprimi. En la apenaŭ penseblaj kazoj de dubo oni povas diri tabaksnuffi aŭ uzi pliklarigan prepozician prefikson.

(Rim de Red.: La fervora diskutado pri tabako, naztabako, fumi, fumiĝi, nazumi, prizi, snuffi ktp. evidentigas la flekseblecon kaj multoblan esprimeblecon de nia lingvo. Pri kio ni nur povas ĝoii. Tamen ni opinias, ke la diskutado nun daŭris jam sufiĉe longe, kaj ni deziras fini ĝin per la spita artikolo de s-ro Lippmann en la hodiaŭa numero.)

Tra la Mondo.

En Supra Silezio okazis striko kaj ribelo por influi la decidan de la Supera Konsilantaro. Diversaj fervojaj pontoj estas perforte detruitaj. La Interalianca Komisiono deklaris la sieĝan stacion super Beuthen, Kattowij, Ratibor, Pless, Rybnik kaj Hindenburg. En Beuthen kaj Kattowij francaj trupoj kun tankoj restarigis la trankvilon.

La 5. Internacia Foiro de Frankfurt okazos de 25. sept. ĝis 1. okt. 1921.

En Tokio partoprenis 20000 personoj la laboristajn demonstraĵojn okaze de 1. majo.

En Jaffa (Palestino) okazis kunpuŝigo inter araboj kaj judoj; 20 personoj estis mortigitaj kaj 150 vundataj. Trupoj dispelis la interbatalantojn.

Sporto.

Ŝako.

D-ro Lasker ĉesigis la turniron kontraŭ Capablanca post la 15-a partio kaj deklaris sin venkita. Li diris, ke li tiel suferis pro la en Habana reganta varmego, ke li ne povis koncentri sian plenan atenton je la ludo.

Bokso.

Carpentier, la franca pugnobatisto, vizitis la 26 aprilo la anglan parlamentajn domegojn, kaj unu el la paramentanoj (s-ro Kenworthy) proponis al li batali tri randojn por bonfaro.

Aviado.

La flugo ĉirkaŭ la teron

nun estas fiksita de l' Aeroklubo de Usono je la tempo de 1. sept. 1921 ĝis marto 1922. La vojo (35000 km) havos kvin kontrolstaciojn: New York, Seattle, Jokohama, Saloniki kaj Paris. Rajtigitej por la konkurso estas ĉiuj posedantoj de internacia pilota atesto. La sumoj de la premioj estas sufiĉe altaj.

Recenzojo.

LIBROJ.

ESPERANTO. Plena germanlingva gramatiko de la internacia helplingvo Esperanto. de Jul. Glöck kaj d-ro Edmund Sos. 7—10. milio. Wien. Eldonejo de Paul Knepler, Lichtensteg 1. 112 paĝoj. 14:20 cm. Prezo ne indikita.

OFFENBACHER LEDERWAREN EXPORT-ADRESSBUCH. (Ledaĵoj de Offenbach. Eksp. Adreslibro) Eldonata de Auslands-Werbegesellschaft G. W. Gärtner. Frankfurt a. M. Prezo 15 mk. En lingvoj germana, anela, franca kaj hispana.

WAAROM ESPERANTO? Door W. Nutters. Eldonejo „De Volherding“, P. van der Leur, Deventer (Nederland). 11 1/2: 15 cm. 16 pg kaj kovrilo. Prezo 10 cendoj.

Propaganda broŝuro en holanda lingvo kun aldono pri la esp. organizacio, pri esp. literaturo kaj gazetaro ktp.

GAZETOJ.

DER ARBEITER ESPERANTIST. Maio. Organo de Germ. Lab. Assoc. Kun raportoj pri vigla movado, precipe de la lab. grupo Düsseldorf.

ESPERANTA FINNLANDO. Aprilo. Kun detala raportoj pri la VII-a Finnlanda Kongreso de Esperanto en Tampere.

ESPERANTISTA LABORISTO. Aprilo-majo. Plej interesa artikolo „El Georgio“.

GERMANA ESPERANTISTO. Aprilo. La bona propaganda gazeto de la germanaj esperantistoj. Propono de d-ro Orthel, ke — post paroladoj pri Esperanto — oni ĉiutage alprenigu rezolucion de la ĉeestantaro. Ŝajnas al mi subteninda. GEA komunikas, ke la nombro de la membroj kreskis en 1920 de 1132 ĝis 3000.

HUNGARA ESPERANTISTO. Aprilo. Intralie bela poemo de Julio Baghy „La majstro mortis“.

Popiro de d-ro Chesquy.

INFORMOJ de Danzica Pén Associo. Aprilo.

INTERNACIA KOMERCA REVUJO. Aprilo.

Post longa neregula aperado nun promesas aperi regule. Certe ĉiu praktikulo ĝoje salutos tion, sed oni eble ne tre ŝatos la novan abonprezon de 10 sv. fk.

ITA A ESPERANTISTO. Aprilo.

Adreso: Via Rossari, 2, Milano.

LA HOLLANDA PIONIRO. Aprilo.

Oficiala organo de Nederlanda Societo Esperantista „La Estonto estas nia“, en nederlanda kaj esp. lingvoj.

LA PROGRESO. Aprilo.

Adreso: Plzen, Podebradova 6, Ĉeĥoslovakio.

LA SUDA KRUGO. Marto.

Organo de la aŭstralaj esperantistoj. En angla kaj esp. lingvoj. Adreso: Melbourne, Box 1367, Elizabeth St. P. O.

MESSZEITUNG (Foirgazeto) Frankfurt a. M. Aprilo.

VERDA UTOPIO. Febr.

Adreso de ĉi tiu ĉi interesa ilustrita revueto: 5265, Uehommaĉi 7-ĉome, Minami-ku, Osaka, Japanio.

Parolejo.

76.

(Rilatas al 68.)

. . . . kvankam tio estus eble al mi persone pli agrabla, pro la afortuna lokado en mian libroŝrankon, ke „Esperanto Triumfonta“ havu formaton de revuo, kiel proponas ĉi tiu viaj legantoj, mi tamen firme opinias, ke — ĉar ET estas precize ĵurnalo, — ne revuo — ĝi devas konservi ĉiujn karakterojn de ĵurnalo, pro kiuj ĝuste kaj precipe ĝi tiel rapide kaj tiel kontentige sukcesis.

(Franca membro de la Esp. Akademio.)

77.

(Rilatas al 68.)

Certe mi aprobas la proponon de via korespondanto pri nova formo de ET, sed mi opinias ke ŝanĝo de la preslitteroj ne gravas.

(B. Hastings, Angl.)

78.

(Rilatas al 68.)

Kiu ajn estos la formato, mi esperas, ke la vorto „Esperanto“ en la litolo restos tiel granda kiel nun kaj rimark- ebla, dum oni legas ĝin en restoracioj aŭ omnibusoj.

(Ch.-G. St.-M., London.)

79.

(Rilatas al 68.)

Mi opinias, ke 1. formato simila al tiu de „Esperanto“ UEA estas dezirinda nur vidpunkte de ĝia konservado, 2. preslitteroj ne diferentaj, 3. mallongigoj ne ebleblaj.

(A. Koh, Warszawa.)

80.

(Rilatas al 68.)

Ankaŭ mi deziras ŝanĝon de la formato de ET: sed ĝi nepre ne fariĝu pli malgranda ol ĝis nun sed kontraŭe pli granda, por ke ĝi simulu al granda ĉiutaga ĵurnalo. Precipe nun, ĉar centoj da ekzempleroj estas venditaj ĉe kioskoj, granda formato faros grandan reklamon por Esperanto ĉe la publiko. Pri la literoj mi ne povas plendi; ili ŝajnas al mi sufiĉe klaraj. (Varsoviano.)

Ne revenanta okazo!

La enaj, bone konservitaj esperantaj kolektoj estas vendeblaj. La notitaj prezoj estas la netaj kostoj en germanaj markoj (mk.), kiujn kaŭzis la kolektado, ne kalkulante la penan kaj senfinan laboron. Parto venas el la kolektoj de s-ro Capé-Montrosier.

1. Ponomera kolekto de 800 diversaj gazetoj, montrantaj la evolucion de la esp. gazetaro deposed 1889. Mankas nur tre malmultaj, negravaj, (1000 mk.)

2. 106 div. gvidlibroj kaj 146 div. gvidfolioj. (300 mk.)

3. 67 div. katalogoj, 276 div. prospektoj, 22 div. komercaĵoj. (200 mk.)

4. 3700 div. esp. poŝkartoj (ne per Esperanto kolektitaj ilustr. kartoj, sed eliksive esp. kartoj kun esp. teksto aŭ esp. bildoj). 528 estas aranĝitaj sur 53 nigraj kartonoj. (2000 mk.)

5. 5160 div. esp. sigel- kaj glumarkoj. Pli ol 3000 estas gviditaj sur 98 nigraj kartonoj kaj en fortika, polurita ligna kasto. (1500 mk.)

La kolektoj estas unikaj, kaj hodiaŭ estas tute ne eble kolekti similajn.

Ofertojn oni direktu al:

P. Tarnow, Kiel (Germ.), Olshausenstr. 18.

Karaj legantoj!

Multaj el vi jam skribis al la redaktoro de ET laŭde, eĉ flate, esprimante vian kontenton pri la enhavo de la unua esp. ĵurnalo. Tamen ekzistas inter vi, kiuj ne estas kontentaj. Kaj ne malprave! ET ankoraŭ ne estas, kia ĝi devus esti kaj kia ĝi devas fariĝi ion post ion. Precipe la literatura parto nun estas tre malzorgata. Sed ni peris la nekontentulojn pacienciĝi ankoraŭ kelkajn manojn: ni certe aliigos la neagrablan situacion kaj pliampleksigos la ĵurnalon, tuj kiam niaj teknikaj cirkonstancoj tion permesos.

Abonoj al ET.

Ni liveras al ne-germanaj landoj:

50 n-rojn por 80 germ. mk., 10 ŝil., 10 sv. fk., 20 fr. fk., 5 hol. guld., 2 dolaroj aŭ 25 litroj (litroj ni akceptas nur el Italio); 25 n-rojn por duona prezo.

Al Germanio, Baltiko kaj Balkano 10 n-rojn por 10 gmk. — Al Polio 25 n-rojn por 150 mk., al Aŭstrio kaj Hungario 10 n-rojn por 30 kronoj, al Ĉeĥoslovakio 15 n-rojn por 20 kr.

Oni pagu per monbiletoj aŭ bankĉekoj.

Germanoj pagu ĝis fino de junio al poŝtekonto Köln 70865, Teo Jung, Horrem; post 1. julio ili abonu per la poŝto.

Negermanoj el bonvalutaj landoj ne pagu per poŝtavizoj, ĉar la poŝto donas parte nur 2/3 de la kurza valoro, kaŭzante al ni ebleblan perdon.

Anoncetoj.

(Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj kostas por dufoja entreso la samon kiel kvin numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja entreso kostas la duoblon.)

FIANĈIGO. D-ro Piscini, esperantisto en Roma (Ital.), fianĉiĝis al F-ino Maddalena Rosi.

SALUTO. La esp. rondeto Scheljabinsk (Rusl.) kore salutas la tutmondajn kaj speciale la germanajn esp. laboristojn.

SIGELMARKOJ, INSIGNOJ KTP. Unua Viena eldonejo de esperantaj propagandaj sigelmorkoj kaj insignoj, Jozefo Kocořek, gravuristo, petas konatojn kaj interesulojn por interrilatiĝo, ĉar mi jam hejmevenis el rusa militkapitejo. Wien X/5, Atrhaber-Play 3-14. Postulu specimenaron kontraŭ unu respond-kuponon.

ESPERANTAJ GAZETOJ. Moacyr Cominha, Boulevard Nogueira Accioly, Ceara, Fortaleza, Brazil, deziras aĉeti la unuan numeron de ĉiuj esperantaj gazetoj. Oni sendu ĝin al li kune kun ĝia prezo. Li pagos per resp.-kup.

INSTRUO AL KONTORO. Juna litova mezlernea instruistino (esperantistino), dezirante perfektigi en uzado de germana lingvo, volas pasigi 2-3 somerajn monatojn en Germanio aŭ Svisio. Povas instrui litovajn, litvan aŭ rusan lingvon, korespondadi en ili aŭ okupiĝi en kontoro. Proponojn adresu al: J. Mačernis, Kaunas, Ŭkmerges pl. 45, Litovio.

PETO, precipe al francoj. — 18-jara ĉeĥo, abituro de reala lernejo, parolanta ĉeĥe, esperante, france kaj germane, deziras labori mane aŭ spirite ĉe elektroteknika entrepreno en Svisio, Francio, Svedio aŭ alie dum unu jaro antaŭ la studado ĉe alia lernejo. Afable skribu al Jan Jelinek, Husovo nam. 511, Hradec Kralové, Ĉeĥoslovakio.

PETO. Esp. Societo „Laboro“ petas ĉiujn esp. redakciojn, eldonejojn, firmojn ktp. alsendi al ĝi siajn prezarojn, katalogojn ktp. por vendado organizata ĉe gl. Adr.: Warszawa (Pol.), Wipolna 47 A, m. 19.

PROVAGANDISTOJ. Bonvolu konstante sendi ĉiujn sciigojn pri interesaj sport-novaĵoj de via urbo kaj de via lando per letero por Sport-Revujo al s-ro Stef. Pedrazzini, Locarno (Svisio).

SPORT-REVUO. Redakto de sport-revujo (adreso: s-ro Stefano Pedrazzini, Locarno, Svislando) serĉas en ĉiuj landoj reprezentantojn (kolektantojn de anoncoj). Nur kapablaj agentoj estos akceptotaj. (Referencoj estas necesaj).

Korespondo kaj Interŝanĝo.

(Dufoja entreso kostas la samon kiel tri numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja entreso kostas la duoblon.)

V. Dobrovolskij, Scheljabinsk (Rusl.), Privokzalnaja poŝto, deziras interŝanĝi esp. ĵurnalojn, ilustr. poŝtkartojn ktp. kun germanaj kamaradoj.

S-ro F. Peedo-Winkel, Fontanka 27, Estokomitee, Petrograd (Rusio), interŝanĝas sovietajn kaj estoniajn poŝtmorkojn.

S-ro Mikko Leulaja, adr. Lohiluoma, Finnlando, deziras korespondi kun la tuta mondo per il. poŝtkartoj kaj leteroj.

S-ro Veikko Lohikoski, adr. Mieto, Finnlando, deziras korespondi kun la tuta mondo per il. poŝtkartoj kaj leteroj.

S-ro Väinö Kyttä, adr. Mieto, Finnlando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj.

S-ro Matti Avinen, adr. Kurikka, Finnlando, deziras korespondi kun la tuta mondo per il. poŝtkartoj kaj leteroj.

S-ro Elias Syyvaaja, adr. Mieto, Finnlando, deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo per il. poŝtkartoj kaj leteroj.

S-ro S. E. Risku, adr. Mieto, Finnlando, deziras korespondi kun fratinoj el ĉiuj landoj per ilustritaj kartoj aŭ leteroj.

Izaak Špilo, Bialystok, Pol., Poŝtkasto 61, deziras korespondi kun germanoj, ankaŭ vendi kaj interŝanĝi poŝtmorkojn, papermonojn kaj monbiletojn.

Interŝanĝi deziras poŝtmorkojn kaj poŝtkartojn kun ĉiuj landoj s-ro Josef Piechocki, Bydgoszcz (Polio), Lokietzi 8 c. II. Al ĉiu certe respondos.

Kiu bezonas bonajn polajn poŝtmorkojn kaj papermonojn-kolektojn, ili povas interŝanĝi poŝtmorkojn kaj papermonon kun mi. Mi korespondas ankaŭ pri matematiko kaj naturscienco. — Lazaro Grosberg, Bialystok (Pol.), ul. Jarowiecka 5.

M. Goldberg, Bialystok, Polujo, Sienkiewicza 88, deziras korespondadi kun germanoj en ĉiuj landoj, ankaŭ interŝanĝi poŝtmorkojn kaj papermonon, kun kiu ajn. Tuj respondos.

A. Hiller, Warszawa, Polujo, Ogrodowa 26/31, deziras korespondadi pri laborista movado, komunismo, ankaŭ interŝanĝi poŝtmorkojn kaj papermonon. Tuj respondos.

Kiu sendos al mi 50 malsamajn, nedifektitajn, stampitejn poŝtmorkojn el sia lando (ne germ., aŭstr. aŭ ĉeĥoslov.), ricevos mult-ilustritan 8- aŭ 10-paĝan esp. gvidolilon. P. Tarnow, Kiel (Germ.), Olshausenstr. 18.

S-ano Josef Jungesblut, Düsseldorf (Germ.), Hoffeldstr. 19-II., deziras korespondi per il. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

Kiu sendos al mi poŝtmorkojn de sia lando, ricevos markojn de mia lando. Ankaŭ mi korespondas per ilustr. poŝtkartoj. — Helmut Janda, Breslau, Germ., Gabitzstr. 125, bei Dolowski.

Erich Haschke, 12-jara, Kronprinzenstr. 11 en Breslau, Germanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj, interŝanĝas poŝtmorkojn kun la tuta mondo; ĉiam respondos tuj.

S-ro Hermann Petermann, Hagen i. W. (Germ.), Fleyersfr. 57, deziras korespondadon kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. (Poŝtmorkoj, poŝtkartoj kaj leteroj). Tuj kaj ĉiam respondos.

Otto Czech, fervoj-oficisto, Brunnersdorf apud Kaaden, Bohemio, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo per poŝtkartoj ilustritaj; interŝanĝas poŝtmorkojn kaj esp. gazetojn.

S-ro Theodor Oster en Godesberg a. Rh. (Germ.), Burgstr. 46, deziras interŝanĝi poŝtmorkojn kun ĉiuj landoj.

Mi vendas hungarajn poŝtmorkojn, multe pli malakraj ol katalog-prezoj. — Kolomano Wiesinger, Budapest VII, Wasselényi str. 30.

Esperantistoj atentu!

S-ino K. Zamenhof en Varsovio petas sciigon, kie nun troviĝas ŝia filino f-ino d-ro Zofia Zamenhof, forveturinta el Varsovio la 1. nov. 1915, loĝinta poste en Štepvka (Harkova gubernio, Ruslando), kunlaboranta tiam en Ziemskaja bolnica. En oktobro 1918 okazis estis saluto, ke ŝi pasigis someron en Kijevo. Ĉiu samideano kaj delegito de UEA, kiu povas helpi aŭ ekscii, kie nun troviĝas f-ino Zamenhof, estas kore petata tuj sciigi laŭ adresoj: aŭ al del. UEA en Varsovio Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, aŭ rekte al s-ino K. Zamenhof, str. Krolenska 41, Varsovio.

Aliaj gazetoj estas petataj noti ĉi-tion.

Harrogate

Liège

Essen

Orléans

Kvar Nomoj. ☆ Kvar Triumfoj.

Samideanoj, vizitu multnombre la Pentekostajn Kongresojn!

3^a Internacia Specimena Foiro en Padova (Italio)

1.—15. Junio 1921.

Unua foiro en Italio en neprovizoraj konstruaĵoj (24000 m²) kaj tute kovritaj trairejoj, en propra kvartalo de 160000 m².

Ciulandaj komercistoj egalkondiĉe akceptataj.
Ĉiuj industrioj allasataj.

Senpagaj Esperantaj presajoj kaj ĉiuj informoj pri partoprenado, vizitado kaj organizado haveblaj ĉe Ufficio Informazioni della

3-a Fiera Internazionale di Campioni in Padova (Italio).

Internacia Foiro de Breslau

Dua Printempa Foiro samtempo 52. Poragrikultura Maŝinfoiro

2.—5. Junio 1921.

Agrikulturaj maŝinoj kaj iloj; maŝinoj kaj iloj por fiŝkaptado, arbara ekspluato, ĝardenkulturo, birdar- kaj abel-bredado, ĉasado; artefaritaj sterkaĵoj, semajoj; agrikultur-industriaj instalaĵoj; maŝinkonstruado kaj tekniko; konstrumetio kaj konstrumaterialo; * * * * * arto kaj armetio, internaj dekoraciaĵoj; buroaĵoj; sporto. * * * * *

Informojn donas

Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.

ESPERANTO-FAKO Breslau I, Ohlauerstr. 87.

Razaparatoj

por poŝto, el laŭno argentumita, en bela nikelumita ujo, tegita per veluro.

Bruligiloj.

Lasta novaĵo: Bruligilo „Patent-krajono“ n-ro 116, uzebla kiel bruligilo same kiel krajono.

Objekto por ĉiutaga uzado. — Seriozaj aĉetontoj mendu nian prezaron. Ni serĉas reprezentantojn.

Muscat & Christlein, Nürnberg, Germ.

Por svisa franko (por 10 germanaj marko) kvin diversaj esperantaj libretoj el la

HUNGARA LITERATURO

rekomendite! Sendu la monon antaŭe kun la mendo (en enskribita letero) al

Hungara Esperanto Servo, Budapest VI,

Hajos u. 15-II-2.

KOMERCISTA ESPERANTO-GRUPO

Freiburg i. Br., Katharinenstr. 14

peras ĉiuspecajn negocojn. — Rilatoj al gravaj germanaj firmoj. Perado senkoste. Uzu niajn servojn!

Angla kaj Esperanta Etimologio

(Angle kaj Esperante).

Verkita de Charles G. Stuart-Menteth.

(Oksforda diplomo kun distingo).

„Utila lernilo por atentigi la anglan publiikon pri multaj Esp. radikoj en ilia lingvo.“

Holanda *Pioniro*.

„Intereseĝaj tabeloj.“ *Kristana Espero*.

Vidu citojn p. 57 de nova Jar-libro B. E. A.

Prezo 10 pencoj (= 4 respond-kuponoj) afrankite.

B. E. A., 17, Hart Street, London WC 1.

☆☆ ITALA ☆☆

ESPERANTISTO

Oficiala Organo

* * de la Federacio Esperantista Itala. * *

Iarabono: 15 Liroj. Helpabono: 20 Liroj.

Administrejo: Via Rossari 2, Milano (Italio).